

# PENSEO

*N-ro 357*

*jul. / 2021*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Ewa Grochowska (Rusio)



### Inter amo kaj malamo

Inter amo kaj malamo  
 Ĉiutaga balancel':  
 Varma kiso, blua mamoo,  
 Vangofrapo, harkareso,  
 Pardonpeto, ruĝaj rozoj  
 Kaj...promeso...  
 Humiligo, ofendvorto,  
 Bela robo, ora ringo,  
 Seksperto.  
 Vana defend', kri engorĝe  
 Pro la dormo de Anĝel'.  
 Kapturigoj nokte, tage.  
 En infera karusel'.  
 Sensukcesa forfuĝina,  
 Enfermita en la kel'  
 Ŝi preferus eĉ la mort'  
 Sed ridetas la etulo,  
 Sin konsolas lia vort',  
 Ĉe la kolo eta mano  
 Kaj balzama voĉ'  
 Frustras ĉe orel':  
 Ne ploru patrin'!  
 Belas via nova kolier',  
 La paĉjpa amas vin.

### Adiaŭo

Ĝi alvenis subite,  
 Senbrue, tigre.  
 Neniu ventblovo,  
 Neniu pordmovo  
 Anoncis ĝin...

Kato dormetis, ronronis,  
 Muŝo promenis sur la kurteno.  
 Apud la lito haltis momenton.  
 Blanka, travidebla formo,  
 Kliniĝis al kusenoo,  
 Mankaresis palan vizaĝon,  
 Du ombroj ekflugis...  
 Jen la korpo inerta.  
 Preĝoj, floroj, tumulto,  
 Plorejoj, kondolencoj.  
 Lasta adiaŭo...  
 Sur la blanka rubando la vortoj :  
 « Ripozon eternan patrino,  
 Ni ĉiam amos vin,  
 Edzo kaj filino »



*okaze de la forpaso de polino Marzena en  
aprilo 2017*

## Wally du Temple (Kanado)



### AGLA INSTRUO

Tribano rigardu aglidojn flugi provante  
 Gepatroj ĉiele spiralas kriĉe vokante  
 La Aglo, Avataro de Spirito videblas.  
 Proksime al montpintoj la instruoj aŭdeblas.  
 Provu, provu la viajn novajn flugilajn plumojn  
 Risku, risku kaj konkeru viajn vivotimojn.  
 Aglidoj aŭskultu, miajn konsilojn aŭskultu  
 De nesto provflugu, ne hezite eksaltu  
 Vi kapablas vivi en la spirita regno  
 Tamen resti ligita al la tera mortregno

## Paulo P Nascentes (Brazilo)



### Grund'fekunda

kial hasto se eble venos halto?  
 kial ordo se bezonatas agordo,  
 mizerikordo en tagordo?  
 kial grizo se tuj post, krizo?  
 kial kolero se post ĝi, infero?  
 kial ne grundo por sisi hirundo?  
 kial veneno se anstataŭ putro, nutro?  
 kial dueco se bezonatas nuanca plureco  
 pluraj ecoj en unueco?  
 kial el krizo ne venu oportuno  
 por tuno da paco anstataŭ puno?  
 kial Tanatos' kaj ĥaoso  
 anstataŭ Eroso?  
 Tanatos' plu bezonatas  
 aŭ ĉu erosa parfumo?  
 ĉu plia dramo? ĉu Lumo?  
 ĉu Vivo? ĉu Amo?



### Surprize

kredas vi ĉu je aĝel'?  
 tiel subite ja diras kredi mi  
 kaj kredi bonas certe

kiel bona plenkreskul' rigardas mi eksteren  
 kaj anĝelojn eĉ mi vidas  
 kie ĉe mi kaŝita se ilin rigardas ene?  
 ĉe ili ĉu subtenas mi? ĉu ŝanceliĝas mi  
 inter jes kaj ne?

sed, ĉu je anĝel' volas kredi mi?  
 rigarde al mi mem!

je anĝel' mi povas kredi  
 apenaŭ rigardante vin!

## Elena Popova (Bulgario)




### Gutoj da sano

En luliloj de folioj  
 miloj da gutetoj  
 dormas sorchate  
 de naturaj sekretoj.  
 Vekas ilin l' Auhro:ro:  
 — Tempo estas por laboro!  
 De malsekaj branchetoj  
 alterighas rosgutetoj,  
 kantas kaj petas:  
 — Venu vi nudpiede,  
 pashu kaj al ni kredu —  
 sanon ni donacas!

### Akvoŝalo

La akvo falas  
 kaj kantas belsone  
 en granda horo.  
 Sorchvortoj sonas...  
 Tage en oro,  
 nokte arghenta,  
 chiam atenta:  
 ghi estas necesa.  
 Rapidas, ne chesas  
 la akvoŝalo,  
 char soifaj atendas  
 akvon la valoj.



### Sub la pluvo

Ĉielaj riveroj  
 fluas al la tero,

sed knaboj sentimaj  
 iras fiere.  
 Knabinoj similaj  
 al edenaj floroj  
 sub buntaj ombreloj  
 ĝojas tutkore.  
 La sun' kaŝe miris  
 al la beleco tera  
 kaj sendis al la homoj  
 sepkoloran esperon.

## Mistera luno

Ien trinkas de la maro,  
 jen ĉion redonas sen avaro.  
 Ĝi similas aŭ al pilko hela,  
 mistere rideta,  
 aŭ al arko, rikolti preta.  
 Iam per arĝentaj ŝuoj sin vestas  
 kaj sur la ĉielo festas.  
 Tiam muzikas orkestro stela  
 por la Luno mistera.



## Siv Burell (Svedio)



### Kio decidas pri miaj tagoj?

Kio decidas pri miaj tagoj  
 la almanako aŭ mi?  
 Perdi ĝin, ho mi havus malbonan senton  
 ĉio grava estas ja en ĝi  
 kiam la dentisto ŝtopu mian denton?  
 kiam iros al frizisto mi?  
 kiam tondi la ungojn de la kato?  
 kiam kontroli pri la ekonomia stato?  
 kiam celebri naskiĝtagojn  
 ĉio estas en la almanako skribita  
 Kio decidas pri miaj tagoj  
 la almanako aŭ mi?  
 Perdi ĝin, ho mi havus malbonan senton

ĉio grava estas ja en ĝi  
 kiam la dentisto ŝtopu mian denton?  
 kiam iros al frizisto mi?  
 kiam tondi la ungojn de la kato?  
 kiam kontroli pri la ekonomia stato?  
 kiam celebri naskiĝtagojn  
 ĉio estas en la almanako skribita

## Post sinpelado — la granda kvieto

Post disa tago  
 venas la kvieto.  
 La ekzaltita ŝtonroko  
 estas ŝanĝita je  
 kvieto  
 kvieto  
 aŭdebla kvieto!

Mi sentas ke  
 la puzleroj de mia animo  
 mem ordiĝas  
 aŭ —  
 estas metitaj  
 de mia nevidebla gvidanto.

## Jadranka Miric (Serbio)



### Florbukedo

La florbukedon aĉetis mi  
 por memori vin pri ni!  
 Ke ruĝaj rozoj ripetu senmortajn  
 viajn pasiajn amvortojn .  
 Ke blankaj majaj floretoj, kara ci,  
 memoras vin pri nia renkonto plena de pasi'!  
 Ke multkoloraj tulipoj  
 ĉiam donas guston de viaj dolĉaj lipoj!  
 Ke violaj bonodoraj siringoj  
 memoras pri sekrete aĉetitaj fianĉringoj!  
 Ke sekigita miozoto mirinda  
 rakontu pri nia ammirinda!  
 Ke la unuaj papavetoj  
 rakontas flustre pri niaj amsentoj!

## A.S. PUŜKIN

## Eĥo

"Ĉu besto muĝas en arbar' silenta,  
 Trumpetas korno, aŭ tondro bruas,  
 Ĉu fraŭlino kantas post monteto —  
 Por ĉiu sono en aer' kvieta  
 Subite naskos vi  
 Resonon vian.  
 Atentas vi la tondrobruon,  
 La voĉon de la ŝtormo, de remparoj,  
 Al krio de paŝtistoj en vilaĝo —  
 Respondon sendas;  
 Sed por vi —  
 Revok' forestas...  
 Jen sama estas vi, poeto!  
 \* \* \*  
 P.S. Pro am' al poezi' eterna  
 Geniajn strofojn provis tuŝi,  
 Amataj estas multe da poetoj,  
 En lok' aparta — A.S. Puŝkin!

*Esperantigis*



**Rita Mkrtĉjan**

**(Armenio)**

## Mimoza Ahmeti



## La kulto

## 1.

Mi bezonas kulton ĉivespere, mi volas  
 humiliĝi,  
 Kisi membrojn kiuj estas sanktaj  
 Oferante  
 Per kora franĝo.  
 Mi bezonas kulton, ĉar terano mi estas,  
 mortebla,  
 Laŭ la leĝo,

Tradicie...  
 Nude mi naskiĝis kaj terure mi militis  
 Por senvestiĝi disde dornaj mitoj  
 Paraidoli.

Mi estas mortebla. Morgaŭ notos ie morton  
 Kiu estas ankaŭ la mia,  
 Kaj nun skribanta, per mia mano la morton  
 notas  
 Dum mi serĉas  
 Feliĉan kulton...

O masklo, orgojle ofendite kiu ĉiam foriĝas,  
 Kiom vi estas kulto. Dio ĉe mi vin savas  
 Kiom vi viro estas, vin de Dio vin savas...

## 2.

Mi estas via kulto, tial mi ululas pro la soleco,  
 Kia terurega torturo la kulto estis  
 De homo kiu volas ke vi turnu lin en kulton,  
 Sed li (ĉar estas pli tiraneca) en kulton vin  
 turnis.  
 Kiom multe da soleco plenigite per paradizo  
 En la lazureco...

Ĉu estas mi via sklavo kiu hieraŭ sin sufokigi  
 volis  
 Pro la malĝojo?  
 (tio igas min dubi en ĉio)  
 Se vi erarus nur ununuran fojon,  
 Sed vi volas la senmortecon tiom, kiom ankaŭ  
 mian koron,  
 Tial vi ne eraras. Kaj neniam okazos  
 Erari.  
 Mensogas tiu diranta ke li volas morti.

Kiom multe da paradizo plenigita per soleco?  
 En la lazureco

1994

## FIKTIVAJ TERMINOJ

Kiomfoje mi fiktivajn terminojn malkovras,  
 La inventaĵojn plenigantaj la vivon per idolo  
 kaj espero,

Kiaj: "La libero", "La virtuo", " la vero",  
 Min ostaraj tremadoj kondukas  
 Pro aŭtentika kompatemo  
 Kaj ideo la larmojn adstringas  
 Pri kiuj plezuraĵoj la trompado kreas,  
 La regado kaj la sankta malvirtuo, kiun mi  
 amas.  
 La martiroj de la pekaĵo ja kun mi estas...

1994

Elalbanigis

**Bardhyl Senimi****(Albanio)**

## El Ĉina Antikva Poezio

**Zhou Bangyan (1057-1121)**

—laŭ melodio *Malrapida kanto de kultado al  
 luno kaj steloj*

Anoncas tambursonoj venon de la nokto,  
 strateton rosoj lavas pure.  
 Lunlum' malhela en strateto longa  
 vuale regas nure.  
 Bambua sojlo kaj fenestro kun lamplumo  
 prezentas korton jen konture.  
 Mi konatiĝas kun ŝi en ĉi korto,  
 ridetas ŝi plezure.  
 Verŝajne kiel jada arbo  
 ŝi sveltas korp-figure.  
 Okuloj ŝiaj kiel matenuro  
 helbrilas senmakule.  
 Molsento ŝia kiel orkideo  
 allogas senmezure.  
 Ha, kia belulino, kiun oni rare  
 renkontas perokule.

En bildo mi jam konas  
 printempan venton vere.  
 Neatendite, kiam mi alvenis  
 al fe-palaco, dronis mi ribele  
 en milda, arda voluptado.

La vento nin panikis jen dispele  
 kaj mi nur loĝis sola en gastejo  
 en frosto malespere.  
 Riglita pordo, disrompitaj muroj,  
 aŭtun-insektoj lamentis mizere.  
 Sopiro mia al amlig' trans montoj,  
 riveroj transportas ja sincere.

## Al prunfloroj

—laŭ melodio *Invadite de floroj*

Trans malalta blankfarbita muro  
 frondo da prunfloroj okulplaĉa brile  
 tamen kun la sama belo  
 kiel la lastjara tre simile.  
 Rosa spur' ankoraŭ restas  
 sur la floroj ĉarmaj pudroŝmire  
 kiel belulinaj purlavitaj vangoj.  
 Mi lastjare sola spektis jen admire  
 la prunflorojn, drinkis, manĝis  
 el porcelanaĵo mens-trankvile.  
 Mi tre ŝatis, ke tavolo' da neĝo  
 kovris arbojn blankprofile,  
 kvazaŭ vata la kovril', bakata  
 sur incensuj' arom-akire.

Sed mi sen aplombo  
 spektas florojn en ĉi-jaro.  
 Ŝajne ili kovas haton  
 en gracila palo,  
 tamen kun domaĝ' daŭrema.  
 Mi rigardas longe sen eraro  
 florojn flirte fali  
 sur verdmusko ar' post aro.  
 Baldaŭ verdaj drupoj  
 jen formiĝos post florfalo.  
 Kiam drinkos mi per drupoj,  
 Mi jam flosos sur ondaro  
 en boat' en vasta la nebulo.  
 Nur en songa la vualo  
 povus mi rigardi florojn  
 kun gracia pozo sen komparo  
 jen oblikve bele spegulitajn  
 en krepuska akva klaro.

—laŭ melodio *Printempo en Luoyang*

Ŝiaj brovoj mincaj povas  
esti komparata vete  
kun imponaj montoj belaj,  
sed plejofte kuntiriĝas ĝen-obsede.  
Ne disverŝu larmojn sur la floron,  
eble ĝi fariĝos magra ja skelete  
kiel la belino ĉargrenplena.

Ŝi jam longe flankenmete  
la jadfluton ne blovludas,  
ĉar neniu ŝin komprenas krede  
ŝian belan flutmuzikon vere.  
Ho, se oni volas interprete  
scii, kial ŝi kun ĉagren' suspiras  
sin apogante sur la balustrad' ripete,  
do, demandu al la salikarbo  
antaŭ l' pavilono pete.

—laŭ melodio *Vojaĝo en juneco*

La tranĉilo brilas kiel akvo,  
salo blankas kiel neĝ' glacia.  
Mandarinon senŝeligas ŝi tenere  
per la delikata man' gracia.  
Pendos ĉambre luksaj falkurtenoj  
regas varmo disradia,  
kaj spiralas incensfum' senĉesa.  
Li kaj ŝi kun sento emocia  
sidas vidalvide kaj ŝi plektras  
la liuton nun je ŝato lia.

Ŝi demandas duonvoĉe:  
“Kie vi tranoktos? Jam malfrue  
estas nun laŭ tempanonco.  
La nebulo densas flue  
kaj la voj' glitigas por ĉevalo.  
Krome ne videblas plue  
la pasantoj sur la strato.

—laŭ melodio *Grua feo*

La kvieta stepo sin etendas  
ĝis la urbomura bazo.  
Longe voj' serpentas,  
polv' leviĝas post kaleŝa paso.  
Montoj banas sin en lumvalo  
de la subiranta suno.  
La restantaj sunradioj super valo  
nevolonte sinkas jen en nuno  
de la balustrad' sur l' urbo sola,  
kun senlima domaĝemo.  
Ŝi paŝetas kun elspiro mola,  
kune kun mi jen sen ĝeno,  
en kioskon apudvojan por ripozo.  
Antaŭtempan rendevuon ni  
ne bezonas jen kun seriozo.  
Najtingalan voĉon uzas ŝi  
por persvadi min demeti  
selon kun kovril' satena  
kaj trankvile preti  
drinki lante per taseto plena.

Mi jam ne memoras sen konscio,  
ĉu matene aŭ vespere,  
kiam mi revenis kun ebrio,  
kiu helpis min ĉevalen vere.  
Vekiĝinte mi jam trovis,  
ke mi dormas en la lito.  
Furioza vento forte movis  
pendkurtenojn ja sen brido.  
Kun ebri' restanta mi rapide  
iris en la korton kaj sinue  
ĉirkaŭiris peoniojn tre ekscite.  
En uesta korto mi senbrue  
ĉuis, kial la venteg' malicis  
falĉi florojn, kiuj devus ja prosperi  
en la ĝardeno. Kaj kapricis  
la vetero tiel malsinceri.  
Do, lasu tempon flui for,  
mi ĝuu ĝojon mem kun bonhumor'.

elĉinigis



**Veĵdo (Ĉinio)**

Qu Fu (1668 - 1745)

## Improvizajo

Por cento da moneroj oraj  
aĉeti ĉevalon ja bonan,  
belinon kaj eĉ altan rangon.  
Sed kie junecon imponan?

Zha Shenxing (1650 - 1727)

## Nokta vidaĵo

Fiŝboata lampo brilas, en malluma  
nokto, kiel sola punkto de lampiro.  
Sur rivero glimas steloj dismetitaj, -  
la ondetoj agitiĝas de zefiro.

Wang Anshi (1021-1086)

## Ascendo al la Alfluginta Monto

Sur l' Alfluginta Monto l' turo altas je mil  
futoj,  
ĉe kokokrioj l' sun' aperas el la horizonto.  
Kaj mi ne timas tiujn nubojn antaŭe  
flosantajn,  
ĉar mi nun staras sur la plejaltejo de la monto.

Liu Kai (947 - 1000)

## Sur la landlima stepo

Fajfanta sago rekte pafiĝas en l' aero,  
pli klare kaj sonore en kalma la vetero.  
Ĉiuj rajdantoj hunaj kun blua okulparo,  
tenante metalbridon, rigardas al ĉielo.

Zeng Gongliang (998 - 1078)

## Loĝi ĉe la bonzejo en la templo Roso

Ĉirkaŭas kapkusenon nubnebulo de mil  
montoj,  
sub-lite vento el pinaro vala sombre kriĉas.

Por vidi kiel batas bordojn furiozaj ondoj,  
rigardi la riveron tra fenestro jam sufiĉas.

Zheng Wenbao (953 - 1013)

## Disiĝo de amiko

Ornamita ŝip' sin ankras ĉe printempa lago,  
ĝis amiko duon-ebriiĝas de grenbrando.  
Ĝi transportas, spite l' elementojn en la svago,  
plenan maĝojecon de disiĝo al sudlando.

*Elĉinigis*



Minosun (Ĉinio)



## Zhuangzi

### ĈAPITRO DUDEK-KVINA

## Peng Zeyang

§25-01

Kiam Peng Zeyang vojaĝis en la regno Chu, la ministro Yi Jie rekomendis lin al la reĝo, sed tiu rifuzis doni al li aŭdiencon. Yi Jie ne plu insistis kaj retiriĝis el la kortego hejmen.

Peng Zeyang iris viziti Wang Guo kaj demandis tiun: “Kial vi ne rekomendas min al la reĝo?”

“Mi havas malpli da influo ĉe la reĝo, ol Gongyue Xiu,” diris Wang Guo.

“Kio do estas Gongyue Xiu?” demandis Peng Zeyang.

“Li estas tia homo,” diris Wang Guo, “kiu pikadas per lanco trioniksojn en la rivero dum la vintro kaj ripozas ĉe la piedo de monto dum la somero. Kiam iuj preterpasantoj demandis lin, li diris: ‘Tio estas mia loĝejo.’ Nun ke eĉ Yi Jie ne sukcesis vin rekomendi, por ne paroli pri mi. Mi ja ne estas tiel taŭga por tio, kiel Yi Jie. Kvankam Yi Jie ne posedas virton, tamen li estas tre inteligenta. En siaj interrilatoj kun aliaj kaj en sia ĉasado de riĉeco kaj honoroj, dank’ al sia inteligenteco anstataŭ al sia virto li ĉiam atingas

sukcesojn. Li ne helpas aliajn disvolvi la virton, sed helpas aliajn detruiri la virton. Tiu, kiu suferas malvarmon kaj tamen ne povas pruntepreni al si vintran veston, nutras nur la esperon, ke la milda printempo revenos kiel eble plej baldaŭ; tiu, kiu suferas someran varmegon, forte sopiras al la malvarma vento vintra. La tuta mondo scias, ke la reĝo de la regno Chu havas aspekton majestan kaj severan. Li estas senindulga kiel tigro kontraŭ krimuloj. Neniu krom tiuj, kiuj posedas grandegan eloventecon aŭ modelan virtecon, povas lin sukcese persvadi.

“Tial la saĝulo en mizero povas forgesigi al siaj familianoj la mizeron; en sia distingiteco li same povas forgesigi al siaj familianoj liajn titolojn kaj agi en humila maniero. Li trovas plezuron en la traktado de aferoj kaj ĝojon en la komuniĝado kun la popolo, dume li ĉiam gardas sian personecon. Tiamaniere li harmoniigas la popolon per instruoj sen vortoj kaj plibonigas la homojn vivante inter ili kiel egalulo. Li harmoniigas ankaŭ la rilatojn inter la patro kaj la filoj, tiel ke ĉiu el ili okupas la lokon, kiu konvenas al li, kaj vivas pacan vivon en la familio. Li vivas en kvieteco kaj senagado, kaj lia mensostato estas tiel malproksime de tiu de la ordinara homoj. Jen kial mi diras, ke vi devas vin turni al Gongyue Xiu kun via peto rekomendi vin al la reĝo.”

#### §25-02

La saĝulo komprenas ĉiujn komplikajn problemojn de la mondo kaj ampleksas en la menso la tutan universon, sed li ne scias, kial la mondo estas tia. Tiu ĉi limigiteco venas el lia denaska naturo. Ĉar li prenas la naturon kiel sian instruiston, tial li estas nomata saĝulo. Se li afliktiĝas pro sia nesufiĉa saĝeco kaj agas kun limigiteco kaj nekonstanteco, kion do li povas fari kontraŭ tio ĉi?

Supozu homon, kiu posedas naturan belecon. Se oni ne diras al li pri lia beleco, li ne scias, ke li estas bela, eĉ se oni proponas al li spegulon. Tute egale, ĉu tion li scias aŭ ne, ĉu tion li aŭdas aŭ ne, lia beleco neniel malaperos. Tio estas la manifestiĝo de lia denaska naturo. La saĝulo amas la popolon kaj la popolo nomas lin saĝulo. Se la popolo ne diras al li, li ne scias, ke li amas la popolon. Tute egale, ĉu tion li scias aŭ ne, ĉu tion li aŭdas aŭ ne, lia amo al la popolo

neniel malaperos kaj ankaŭ lia harmonio kun la popolo ne malaperos. Tio estas la manifestiĝo de lia denaska naturo.

#### §25-03

Homo ekzaltiĝas tiam, kiam li revidas sian patrolandon aŭ sian naskiĝlokon. Eĉ la densaj arboj kaj herboj kovras la naŭ dekonojn de la lando, li same ekzaltiĝas. Li estas ekzaltita precipe tiam, kiam li revidas kaj reaŭdas, kion li kutime vidis kaj aŭdis. Ĉio tio frapas lin tiel, kvazaŭ granda teraso alta je dek *fen*-oj subite ekaperus antaŭ la homoj.

#### §25-04

La reĝo Ranxiang kaptis la esencon de la Taŭo kaj sekvis la naturan evoluon de la estaĵoj. Li havis nek komencon, nek finon kune kun ĉiuj estaĵoj en la mondo. Li ŝanĝiĝis kun ĉiuj estaĵoj en la mondo, sed li tenis sian internan menson pura, ĉiam en perfekteco.

Se ni prenas la naturon kiel nian instruiston kaj tamen ni malsukcesas en la sekvado de la naturo, tiam ni en efektiveco konkuras kun la estaĵoj en la mondo kaj sekve perdas nian denaskan naturon. Tiel agante, kiel ni povus konformigi nin al la naturo? Por la saĝulo ekzistas la ideo nek pri la naturo, nek pri la homo, nek pri la origino, nek pri la estaĵoj en la mondo. Li sin movas kun la naturo sen halto kaj travivas ĉion sen perdo. Kiel perfekte li konformigas sin al la naturo!

#### Elĉinigi



**Wang Chongfang**

(Ĉinio)

# Ĉineske

Gu Hao

Rigardi foren sur Ĝongŝan-monto

—laŭ ĉinesko *Ĉarma Kantistino*\*

Ni rigardu  
foren al  
ĉio tra bela ter’.  
Nia Ĉini’



meritas  
 nomon de ŝtala fer'.  
 Nuboj dancas.  
 Surfoj ondas  
 nur kiel neĝer'.  
 Elitoj 'stas  
 cis kaj trans la river'.

Kun grandioza plan',  
 antaŭen velu  
 en primaver'.  
 Disŝvitu por  
 senigi  
 homaron je sufer'.  
 Vi ekridos  
 pro centjara  
 frukto kun fier'.  
 Por granda song',  
 ni tostu al ĉiel'.

\* *arma Kantistino (ine: Niannujiao): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun po 11 versoj de 436, 436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimarangó xxa, xxa,xxa,xa (x = senrima)*

Esperantigis



**Zhuang Qixiong (Ĉinio)**

**Jadranka Miric (Serbio)**

**Suno**

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Finfine  
 sun' radie min  
 kaptis.Ĝia brilo en  
 okulo nestis.Virin'  
 ĝojsalutas vin!

Briletas  
 sunradioj tra  
 malseka kaŝtenbranĉar'.  
 Ĉifona morto putras.  
 Ludo vetera!

Malestas  
 la akvoperloj,  
 baldaŭ vaporiĝontaj.  
 Sekiĝis la branĉaroj!  
 Aŭdiĝis pigoj.

Krepusko  
 super montaro  
 fabeliĝis. Ĉielo  
 pleniĝis de stelaro!  
 Vibranta aro.

Ĉiela  
 lakto vojo nun  
 pompe malfermiĝis. Dum  
 luno ruĝiĝis .Ĉu pun'  
 Kongo ĉagren' nun.??

**NATURA KAPRICO**

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Kaprice  
 Verdiĝis herbej'.  
 ekfloris fruktodona,  
 la kaŝtena arbarej'.  
 Jam Junio, hej!

Surprizoj  
 Klimataj ŝanĝoj.  
 Malfruas somero ĉar  
 revenis du monatoj.  
 Je ĉiu malĝoj'.

Matenoj  
 malvarmis ege.  
 Sur montoj forte neĝis.  
 Majo finis ventege  
 kaj vulkanrege!

Malbonaĵ'.  
 Kia vetero  
 tia ĉiutageco.  
 Ekis milito.Tero  
 ektemis .Vero.

Suferoj  
 sangoj kaj bomboj ,  
 en la dudekunua  
 jarcento! Scias bestoj!  
 Ve, al fi homoj!

## Junia ŝtormo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

Ekpluvis,  
 post fulmobrilo  
 ektondris forte. Timo  
 en mia okulpupilo.  
 Ĉielpafilo!

Seka ter’.  
 Akvo sorbiĝas  
 rapide. Ter’ vekiĝas.  
 Herbejo tuj verdiĝas  
 kaj pli densiĝas.

Natura  
 freŝa spirado  
 dum akvogutoj brilas.  
 Valora atendado:  
 terakvumado!

Odoras  
 tero kaj ĉiuj  
 florigardenoj. Plenplenas  
 frukto arbejoj! Tiuj  
 bonas por ĉiuj!

Norda vent’  
 forta ĝisoste  
 penetras kiel akra  
 ruĝa kapsiko. Poste  
 blovas ventvoste!

*\*\*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*



## Ivaniĉka MAĜAROVA (Bulgario)



# Amo

Ni estis el unu vilaĝo. Eĉ – najbaroj. Li estis pli aĝa ol mi kun kelke da jaroj, sed ludis kun ni la pli maljunaj. Oni diris al li bate\* Vlado. Lia nomo estis Vladimir, sed mi diris al li bate Vladko, tiel diris al li lia patrino. Kiam oni frapis pli forte per la pilko mian kapon, li venis ĉe mi, brakumis min kaj karesis la frapitan lokon. Komence mi ne komprenis tiun geston, sed estis al mi bone. Sed kiam li iris lerni en la urbo, mi komprenis, ke mi amas lin. La ludo jam ne estis tia, kia, kiam li estis inter ni.. Li revenis dum la festotagoj kaj ni denove ludis, sed li jam ne brakumis min. Sed al mi estis bone, ke li estas tie ĉi inter ni. Sed li komencis reveni pli rare. Dum la ferioj li iris ie alie. Kaj mi... Mi lin amis ĉiam pli forte kaj miaj revoj iĝis ĉiam pli grandaj. Mi kreskos, finos lernejon kaj li venos ĉe mia patro kaj ekvolos min pri sia edzino.. Ho, kiel bele mi revis!

Jen ke kaj mi oni sendis lerni en la urbo de Vladko.

Ni estos kune. Ni revenos vilaĝe kune kaj kune ni iros al la urbon. Dum la unua jaro estis tiel, sed poste... Poste li iris studi en la ĉefurbo. Kaj mi denove restis sola. Sed mi atendis. Pacience. Mi estis amanta. La geamantoj scipovas atendi. Mi komprenis, ke ili povas kaj pardoni. Oni diris al mi, ke li havas amikinson, same kiel li studentino. Mi ne kredis. Kiam li revenis, mi lin demandis.

—Kiu vin diris?

—Oni min diris. Diru!

—Ĉu vi pridemandas min?

—Ne, sed ja...

—Kio ja?

—Ĉu ne ni estas geamikoj...

—Jes, geamikoj kaj nenio alia!

Mi ekploris.

—Pro kio vi ploretas? Ĉu mi promesis al vi ion alian?

—Ho, ne. Ne, sed...

—Tiam?

Ni disiĝis, sed mi daŭris lin ami kaj esperi.

Posttempe mi sciigis, ke li edziĝis. Pri tiu knabino, la studentino. Ŝi estis filino al iu altrangulo. Mi memmortigis. Mi volis morti. Mia patrino apenaŭ savis min. Amo!!! Apenaŭ tiam, pere de la doloro, mi komprenis kio estas amo.

Mi ne volis lerni. Apenaŭ mi finis gimnazion. Mi revenis vilaĝon. Edziĝis mi pri la unua, kiu ekvolis mian manon. Mi lin ne amis kaj ne enamigis, sed mi naskis al li knabon kaj knabinon. Li diris, ke min amas. Kaj certe amis min. Li estis gaja homo, li amis la kompaniojn, ludis akordionon. Kaj mi fermata kaj ĉiam trista. Mi ne povis forgesi Vladko-n. Li eksedziĝis. Ŝajne granda amo, tamen... Mi ekatendis. Kion? Sed nenio okazis.

Mi laboris en iu entrepreno kun multaj virinoj. Unu el miaj kolegiinoj, kiam iris al la kantino aĉeti ion pri manĝeto, ĉiam aĉetis kaj por mi. Regalis min aŭ kun bulketeto, aŭ kun ĉokoladeto. Mi min ĝenis de ŝia atento al mi, ĉar mia familia budĝeto ne permesis al mi tiom da malŝparemo. Mi prenis ilin, dankis al ŝi, sed ĉiam diris al ŝi, ne fari tion, ĉar mi ne povas repagi al ŝia gesto. Sed mi ekpensis pro kio ŝi tion faras? Ne tre longtempe mi eksciis. Ŝi estis amatino al mia edzo. Nenion mi eksentis. Ne dolorigis min. Mi lin ne amis. Ni vivis. Kiel ajn ni nin komprenis. Ni ne havis skandalojn.

“ Al li mankas la amon, kiun mi ne povas doni lin. Mi amas aliu. Kaj li ĝin serĉis alie. Sen amo oni ne povas vivi “ – tiel mi min diris kaj ne kulpigis lin. Mi diris al li, ke mi scias. Mi decidis kaj mi serĉi amanton. Mi provis, sed ne iĝis. Mi ilin kompatis kun Vladko kaj li ĉiam gajnis. Sed kaj la koro ne permesis al mi, mi ne povis amiĝi.

Kaj ŝi, la amatino de mia edzo, daŭris aĉeti min ĉokoladon kaj mi daŭris preni ŝiajn etajn donacojn. Eĉ ni iĝis amikinoj. Mi pensis, ke post kiam ŝi amas mian edzon, ŝi ekamiĝis kaj min.

Dum la juneco mi estis belega. Eĉ oni diris, ke mi havas la ĉarmon de trista madono kun longaj bukraj peĉnigraj hararoj. Nigraj kurbaj brovoj kaj sub ili iuj griz-verdaj okuloj, petintaj amon. Belstatura, pli baldaŭ malalteta ol stangea manikenino.

Kaj iu tage mia nova amikino diris al mi:

—Mia edzo multe plaĉas vian hararon. Li volas almenaŭ foje ĝin hirtigi.

—Li havas ĝin! – diris mi nevole kaj sola miris al la respondo. Sed ne, nek li, nek mi nin decides al tio. Estis nur babilado. Mi ankoraŭ amis lin, mian infanan amon.

Kaj li aĉetis unuĉambran apartamenton je nia strato. Denove li eksedziĝis. Ni nin renkontis, sed li ne salutis min, ne ekrigardis min. Ĉu li estis kulposenta, aŭ...

Iu tage mi lin haltigis. Estis post kiam mortis mia edzo.

—Pro kio vi iun “Bonan tagon” ne diras al mi?

Li silentis kaj rigardis flanke.

—Vi scias, ke pro vi mi memmortigis min.

—Jes, mi scias. Kaj doloras min, sed...

—La pasintecon oni ne povas revenigi, sed almenaŭ ni nin estimi, kiel homoj – diris mi kaj ekiris. Mi tuta tremis. Mi komprenis, ke la tempo ne kuracas. La animo tristas pri la perdita amo, kiu restas profunde en la koro. Tie, por ĉiam!

Ni nin renkontadis. Ni komencis interparoli. Kiel mi volis li min invite trinki kune kafon. Li ne faris tion. Kaj mi ne kuraĝis. Mi timis ne forpeli lin per mia insisto. Estis al mi malpeze al la animo nur de tio, ke mi lin renkontis kaj ni interŝanĝas iun vorton.

Iu nokte, estis post 22 horo, iu eksonorigis la pordon.

Tiom malfrue! Kiu povas esti? Certe mia bofilino. Ŝi havis malagrablaĵojn kun mia filo. Li drinkis.. Ŝi plendis al mi, ĉar ŝi ne havis patrinjon, sed kaj mi vidu kian filon mi edukis. Doloris kaj min, sed malgraŭ ĉiuj miaj agoj, mi ne sukcesis savi lin de tiu plago.

Mi malfermis la pordon kaj kion mi vidi. Li. Staras, rigardas min kaj silentas. Kaj mi silentas. Mi ne invitas lin eniri. Sed kiom da fojo mi revis, ke li trapasos la sojlon de mia domo kaj diros: “Pardonu! Mi venis! “

—Senkulpigu! Mi venis! — kaj kvazaŭ la ĉho ekportis lian voĉon, kiu eniris mian domon. Por ĉiam!

—...



